

# Tagiĝo 35

1957/VI

Cirkulero de Esperanto Junularo en ĈSR

N-ro 35

Eldonas: Dům Osvěty P. Bezruč v Opavě/Domo de Kulturo  
Petr Bezruč en Opava. - Redaktas: Jaroslav Mařík, Malá  
Štěpánská 9, Praha 2 – Nové Město, Ĉeĥoslovakio

---

## KIEL NI APERADOS?

En la fino de la lasta jaro ni planis eldoni dum 1957 "tagiĝon" presita kun ilustraĵoj. La cirkonstancoj tamen devigis nin forlasi tiun planon. De la nuna numero ni revenas al la modesta multobligita formo de cirkulero, kun reduktita enhavo, kiu publikigos en konciza maniero la ĉefajn okazaĵojn.

De septembro ĝis la jarfino ni deziras eldoni 2-3 pluajn numerojn. La kontribuantoj notu, ke iliaj informoj por la 36a n-ro atingu nin antaŭ paso de 10-a de septembro.

Kiel pri la abonkotizo? Ĉar ni ne rajtas eldoni regulan presaĵon kun difinita abonpago, ni povas vin peti sole pri sendo de libervola sumo por kovri la elspezojn de la cirkulero por la papero, multobligo kaj afranko. Kiu do deziras ricevi nian cirkuleron, sendu la sumeton al J. Kuzník, Mendlova 21, Opava.

## LA JUNULARAJ ESPERANTO-TENDAROJ EN ĈEĤOSLOVAKIO.

Nia E.Junularo daŭrigas la tradicion de Someraj Esperanto-Tendaroj /SET/, fonditan en 1952. SET donas al la gejunuloj tri allogajn eblecojn: 1/ Ellerni la fundamentojn de Esperanto aŭ pliperfektigi en ĝi aŭ akiri la kapablecon gvidi kursojn - laŭ la diversaj kategorioj de kursoj. Oni studas ankaŭ la literaturon de Esperanto kaj la historion de la movado. 2/ Pasigi la libertempon ne nur utile, sed ankaŭ agrable en plena naturo, ĉar SET okazas ekster la priloĝataj lokoj, sur herbejo en arbaroj, kutime apud rivero. 3/ Vivi dum 14 tagoj en edifa samideana medio, interkonatiĝi kun junaj geesperantistoj el multaj regionoj, lerni E.kantojn kaj entute ekkoni almenaŭ parte la kulturon de la Lingvo Internacia.

Nunjare okazas du Someraj Esperanto-Tendaroj, kiujn aranĝas: 1/E.Rondeto ZK Jitex en Písek, 2/E.Rondeto de Domo de Kulturo, Třebíč. La unua okazos 14.-28.VII. en Popelná, poŝto Stachy, distrikto Vimperk. Komplete ekipita tendaro, por 90 partoprenantoj; tendoj kun matracloj. Popelná (dříve Rekersberg) situas en alteco 813 m, sub la monto Popelná hora (1085 m), en la montaro Kašperské hory, la loko en arbariĉa regiono. Plej proksima por SET estas la aŭtobushaltejo Nicov.

En SET oni kompreneble devas subiĝi al la elementa tendara disciplino kaj al la devo diligento studi kaj prepari sin por ekzamenoj, kiuj okazas fine de la tendaro. La ekzamenitoj ricevos studateston. Okazos kursoj elementa, perfektiga, konversacia, instruista. En A kaj B oni instruas kaj ekzamenas ĉeĥe, en C kaj D en Esperanto.

En Popelná oni antaŭvidas partoprenon de gastoj el Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Svedlando. Eventualajn informojn donas s-ano L. Křivánek, Zborovská 1332, Písek. Sed atentu: SET en Popelná estas jam plene antaŭokupita kaj ne akceptas plu aliĝojn!

La akceptitaj aliĝintoj ne forgesu, ke akcepttago estas dimanĉo!

La alia somera tendaro estos aranĝata en du etapoj 14-tagaj, apud vilaĝo Koněšín, en belega valo de rivero Jihlava (fervoja haltejo Studenec), I. (21.7.-4.8: Kursoj elementa kaj perfektiga; II. (5.- 17.8.: kursoj elementa, perfektiga kaj konversacia (A,B,C). Oni akceptas aliĝojn kun rekomendo sendi ilin ĝis 10.VII. (en tiu okazo oni ĝuas 50% fervojrabaton). Prospektojn kun aliĝilo sendas kaj aliĝojn akceptas: Esperantský kroužek při Domě osvěty, Třebíč.

La kosto de la 14-taga restado en ambaŭ tendaroj estas po 220,- Kčs. Ekskursoj: ambaŭ SET aranĝos por siaj partoprenantoj unutagan ekskurson per aŭtobuso en belaj regionoj. La veturkosto en ambaŭ okazoj estas 40,- Kčs. - La ĝeneralaj informoj pri SET en Popelná validas ankaŭ por SET en Koněšín.

Aliĝu al SET en Koněšín!

TUTMONDA FESTIVALO DE JUNULARO KAJ STUDENTOJ POR AMIKECO KAJ PACO EN MOSKVA (28.7.-11.8.). La gazeto "Festival", kiun TKKE-Jun.Sekcio ricevas en franclingva eldono, raportas en n-ro 12: "RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ". - "La rolo de la esperantistoj en la aktiveco por interproksimiĝo de la popoloj" -- Jen la diskut-temo de la renkontiĝo. La programo antaŭvidas projekciadon de filmoj en Esperanto. La renkontiĝo daŭros du tagojn." --- Kiu el ĈSR? Ĝis nun ni scias, ke el la esperantistoj veturos al Moskva s-ano Miloslav Jíra, en Jablonec, Jungmannova 7, oficiale kiel turisma delegito. - Alia delegito, Milan Šovar, Mladá Boleslav, závody AZNP, mechanika II., lernas Esperanton, ankaŭ en Hradec Král. 2 gejunuloj. - El Hungario veturos proksimume 10-membra delegacio esperantista sub gvido de junul. sekretario de HEK, s-ano Imre Ferenczy. - En la franca delegacio troviĝos kvin esperantistoj, kiuj traveturante Pragon fine de julio deziras renkontiĝi en la stacidomo kun pragaj samideanoj. --- Laŭ informo, veninta al ni el USSR tra Anglio, la tuta vietnama festival-delegacio lernas Esp-on, ankaŭ la Armea Artista Kolektivo. - Ankaŭ Bulgario, kie aperas bela Esp. cirkulero "Esperanto-Festivalo", sendas Esp. delgitaron.

La moskvaj kaj lenirgradaj esperantistoj preparas brilan akcenton por la esp. festivalanoj. Okazos ekspozicio de Esperanto. Ĉiu laŭeble helpu per sendo de esperantaĵo al la adr.: USSR, Moskva, 400 ul. Kropotkina 37, Esperanto-fako.

xxxxx

PRELEGVOJAĜO DE FERENCZY EN ĈSR (laŭ invito de Junularo Olomouc)

S-ano Imre Ferenczy (25j.), diplomita kuracisto, junulara sekretario de Hungarlanda Esp.-Konsilantaro, volas viziti dumsomere Ĉeĥoslovakion por prelegi en junularaj rondoj pri la Moskva Festivalo kaj pri la E-movado en Hungario. Kiu rondo povus aranĝi lian prelegon, kontaktu, pro mallongeco de la tempo, rekte al s-ano Imre Ferenczy. Lia adr.: 2. sz. Kórház, EGER, Hungario (valida nur ĝis la fino de julio). - Ni rekomendas la aranĝon kaj petas informi ankaŭ nin, pro ke ni sciu, kiuj lokoj invitis s-anon Ferenczy kaj por kiu dato.

xxxxxxx

GEEDZIĜO. Nia longjara populara SET-estro Josef Slonický en Opava kaj s-anino Věra Palová geedziĝis 13.IV. Ni kore gratulas al la nova esperantista paro. (Adr.: Opava, Holasická 53.) - La red.

PROMOCIO. La konata junulara alktivulo kaj estinta ĉefdelegito de la E-Junularo en ĈSR, s-ano Jan Werner, estis promociita 25.5. en Brno je inĝeniero-arkitekto. Sinceran bondeziron! (Adr.: Lanškroun, Gottwaldova 65.) - La red.

Plu estis promociitaj: 2.6. Anička Mrázová-Veselá en Praha je profesorino de lingvoj. Ŝi estas iama loka delegitino en Praha. Ni kore gratulas! (Adr.: Rokycany č. 312.)

3.7. Zdeněk Čapek en Praha je ekonomo por ekstera komerco. Li estas kelkjara membro de E-Junularo en Praha. Gratulon! (Adr.: Praha 16-Smíchov, Pivovarská 3.)

ADRESSANĜO. La kunredaktoro de Tagiĝo s-ano Vlastimil Novobilský ne plu loĝas en Praha 1-Malá Strana, Újezd 11, sed en Ústí n.L., Na vlnovce 710/3!

Deziras korespondi kun ĉs. gejunuloj: 1/Ferenc Sugataghy, Doroszmai u.105, Kiskundoroszma, Hungario. - 2/Spas Nikolov Spasov (14-jara), ul.9.Septembri 175, Kazanlik, Bulgario.

## EL LA VIVO DE LA JUNULARAJ GRUPOJ

Dum la lastaj monatoj la raportoj de la regionaj delegitoj malplimultiĝis. Tion influis ankaŭ la neregula aperado de "Tagiĝo". Ni esperas, ke la situacio denove pliboniĝos! Regionaj delegitoj! Sendu al mi resuman raporton komence de septembro pri la tempo, pri kiu vi ankoraŭ raportis! - La ĉefdelegito.

SUDA KAJ OKCIDENTA BOHEMIO:

**Ĉ. Budějovice.** S-ano Prof. Wurm gvidis kurson por gestudentoj. Kelkaj aliĝis al SET en Popelná. El la grupo de Netolice aliĝis 4 al SET en Popelná. Loka delegito: František Nymburský, Hrdějovice u Ĉ. Budějovic. -- **Chomutov:** LD: Věra Klímová, Chomutov. Ŝi volas iniciati fondon de esp. rondeto. - **Karlovy Vary:** Lázeňský časopis daŭrigas informojn pri la vivo de la Loka esp. rondeto. LD: Jan Kazda, Kar. Vary. - **Litvínov:** regulaj kunvenoj en Stalin-uzinoj ĉiumerkrede je 19.00a h. 15.5. Okazis en Rudolice sukcesa prelego de s-ano Vítek el Praha pri Finnlando. Post libertempo preparata nova kuso. Loka del.: Jaroslav Kopřiva, Krupka u Teplíc Lázní. **Plzeň:** La kunvenoj regulaj, ĉiumarde en gastejo Anglický dvůr. Unufoje monate komuna kunveno kun pli aĝaj. La kunvenojn vizitadas ges-anoj el Chotěšov kaj Nýřany. En SET partoprenos 4 el Plzeň, 4 el Chotěšov, 1 el Nýřany. LD: Věra Kulišková, Plzeň. -- **Písek:** 2.4. finiĝis elementa kurso kun ekzameno. 28.4. Ok grupanoj ĉeestis samideanan kunvenon en Strakonice. Nova LD: Josef Šortner, Písek. Montrofenestro sur la ĉefplaco. Por la urba prikultura informilo oni verkis pri Komenský--pioniro de la internacia lingvo. 2.3. J. Vítek prelegis pri Grenlando kaj Norvegio. Radiostacio Ĉ. Budějovice elsendis jam 3-an raporton pri laboro de nia rondeto. La ĉefa klopodo de la rondeto la statempe celis al sukcesa organizo de SET en Popelná. -- **Poděbrady:** 30.1. fondiĝis laŭ iniciato de Hana Sekotová rondeto kun 11 membroj. La kurso okazas merkrede en lernejo (ankaŭ kun historio-instruo kaj societludoj). Gvidas ĝin s-anino Sekotová, nova esperdona laborantino. En lernejo murgazeto. Komence de la nova jaro okazos nova burso. Multe helpis la paroladvizito de s-ano V. Ehtner el Praha. Por monatoj majo kaj junio oni preparis kunvenprelegojn de la gejuruloj. LD: Hana Sekotová, Poděbrady. - **Strakonice:** Propra junulara grupo dume ne ekzistas, sed la junaj komune vizitadas diversajn kulturprogramoj kaj ekskursas. Dum junio en kunvenoj oni pliperfektigis en la lingvoscioj. Oni ankaŭ intencas kontaktiĝi kun ges-aanoj el Horažďovice. LD: Věra Tomanová, Strakonice II. - **Ostrov:** Finis la kurso gvidita de s-ano J. Kafka, kiu ankaŭ fondis la grupon kun 16 anoj. Nun ili atendas akcepton de la ZK ROH. LD: Jan Kafka, Perštejn nad Ohří. - **Praha:** La junularo de EK Praha kunvenadis regule marde por ekzerci la lingvon, aŭdi raportojn diversfakajn (laŭ hejmaj taskoj), ekscii novaĵojn. Ĝi krome helpis en laboro por la dum paskaj renkontiĝoj en Praha. S-ano Novobilský finis sian 74-paĝan skizon pri esp. literaturo kaj sendis al Opava por preso. S-ano. Novotný finis du kursojn por blinduloj. Somere Junularo kunvenadas sole merkrede en EK Praha. -- **Mariánské Lázně:** Jarmila Vokalová, Střed. správa lázní ROH, Ruská 10, studas E-on kun kelkaj amikoj. -- Ĉu ili fondos rondeton?

ORIENTA BOHEMIO (Laŭ rap. de 27/2)

**Chrudim:** S-ano Dušánek komencis organizi esp. movadon kun la celo fondi rondeton. En januaro komenciĝis kurso kun 3 partoprenantoj en Kleriga Domo. - **Lanškroun:** Perfektiga kurso daŭras kun proks. 7 anoj. Kurso por infanoj regule en ĉiu ĵaŭdo. -- **Pardubice:** Kunvenas ĵaŭde. Elementa kurso, komencita en sept., daŭras kun 10 pers., 12-15 progresintoj kunvenas ĵaŭde 20-22 h. De 7/2 ili havas klubejon en Osvětová beseda 3. En marto estis aranĝita prelego de J. Vítek kaj vizito al konferenco en Hradec Kr. - 6/12 dum dum amika amuzvespero 38 ĉeestintoj trovis bona distron per ĉeĥa kaj esp. programo kaj danco. 14 rondetanoj aliĝis al UEA.

REGIONOJ BRNO KAJ JIHLAVA: (januaro-aprilo)

**Brno:** La Junularo regule kunvenanta, helpis en laboro por esp. seminario kaj maskobalo kaj organizis regionan jun. konferencon. Pri la araĝoj meritis precipe J. Werner kaj M. Lorková, RD O. Kaláb. 29.1. prelegis sukcese en EKB pri "Sporto kaj Olinpiadoj". Nova estraro elektita kun Andrej Valjan kiel prezidanto. - **Svitavy:** A-kurso finiĝis 18/12 kun 78% de aliĝintoj. B-kurso daŭras en kadro de klubkunvenoj. Partopreno kaj lingva nivelo estas bonaj. La direkcio de SVITAP ebligis multobligon de lerno-tekstoj. S-aninoj J. Boháčková kaj R. Haasová vizitis karavabe Sovetunion kaj

trovis tie varman akcepton de multaj esp-istoj. Multaj anoj korespondas kun USSR. -Dun kunvenoj okazas ankaŭ prelegoj pri la esp.historio. Esp.biblioteko estis fondita en decembro. Nova laborkomitato de rondetoj: J.Kuba, L.Rýznar, Pokorný kaj Zedník.

- **Třebíč:** Pro malsano de s-ano Kilián la A-kurso stagnis de januaro, B-kurso sukcese daŭris. Aprila rap.: A-kurso daŭras nur kun 4 partopr., B kun preskaŭ 100%. La B-anoj tradukas en E-on diversajn verkojn ĉeĥajn En novelektita estraro estas i.a.: prez. Jar. Habeš, sekr.Bl.Daňhelová, Lingva fako – T.Kilian. - **Žďár n. Sáz:** Tri kursoj. Plej granda intereso en porinfana kurso. 6. 2. prelego de nederlanda s-ano van Denzen kun lumbildoj plaĉis ankaŭ al membroj de la Domo de Kulturo. Ĉiukiunve devas iu membro paroladi diversteme. Imitinda!

#### REGIONO OLOMOUC:

Neniu raporto venis. Ni petas s-aninon Kubáčová, ke ŝi raportu almenaŭ kvaronjare. Ni volas aŭdi ankaŭ pri via rondeto! - De s-ano M. Rudolf ni sciiĝis, ke la Junulara Rondeto fariĝis memstara, ĉar kiel tia ĝi povas ĝui subtenon de la koncerna institucio.

#### REGIONO OSTRAVA

**Ostrava Junularo VŽKG:** zorgas pri sia plimembriĝo kaj klopodas krei plej bonan medion. Oni aranĝas por kursanoj popularajn prelegojn, gajnadas por viziti regionajn kunvenojn k.s. Reg.kunvenojn partoprenis en Olomouc 18, en Brno 25, en Havířov 21, en Hradec Král. 15 anoj. - Daŭras du A-kursoj (14 kaj 17 part.), B-kurso (12) kaj C-kurso (15). Agitante por SET 1957 27.3. estis prezentita (kun lumbildoj) programo pri pasintaj SET kun rakontado de gajaj travivaĵoj. - En aliaj lokoj daŭras kursoj, pri kiuj ni jam raportis. - En Vítkovice okazis kurso por 37 infanoj (gvidis s-ano Slaný). - **Havířov:** S-ano Instr.O.Schwetter denove iniciatis organizon de internacia gimnastika konkurso okaze de Internacia Infana Tago. Li ankaŭ gvidas kurson por infanoj. - **Třinec:** En OUPZ 16 s-ano Pomykacz gvidas kurson por 15 metilernantoj. Membro de Jun. VŽKG V.Šimeček faris anonciston de programeroj dum publika estrad-programo. 6.4. en Místek, propagandante sentrude E-on al neesp. ĉeestantoj. - **Opava:** Dum la merkredaj kunvenoj okazas B-kurso. Elementan kurson gvidas J. Kuzník vendrede. - **Jakartovice:** Kurson por 10 infanoj kaj 5 plenkreskuloj gvidas s-ano Hadámek. -- La raporto enhavas ankaŭ programon de prelegoj en Jun. VŽKG, kiuj estas utiligeblaj eĉ en aliaj lokoj. Kiu grupo volas prunti ilin, skribu al: Drahomír Kočvara, Ostrava VIII.

**SLOVAKIO:** S-ano Zvara informis min 4.3. pri preparoj por esp. tendaro en Malalta Tatra. Sed pli poste ni sciiĝis, ke ĝi ne okazos. --- La ĵurnalo "SMENA" raportis 23.2, pri kontakto de junaj esp-istoj el Poprad kun Komsomolanoj en pluraj urboj de USSR.

A T E N T U – Ŝ A N Ĝ O La adreso de I.Ferency, aliloke indikita, validas nur ĝis 15.7. Posta adreso: Esztergem – tábor, Sátorkei u.8.